

# ESPERANTOLEHTI

Esperanta Finnlando

Esperantobladet

Huhtikuu ♦ Aprilo

2/2000



**Esperantoliiton talvipäivät Rovaniemellä, s. 6-7.**

*Kuvassa kulttuurikeskus Arktikumin esittely meneillään.*

# Esperantolehti

## Esperanta Finnlando ♦ Esperantobladet

ISSN: 0787-8206

Kielipoliittinen aikakauslehti. Suomen esperantoliitto ry:n äänenkannattaja.

Språkpolitisk tidskrift. Organ för Finlands Esperantoförbund.

Lingvopolitika periodaĵo. Organo de Esperanto-Asocio de Finnlando.

Perustettu/Grundad/Fondita 1918. Esperantolehti ekde/från 1989 lähtien.

Esperanta Finnlando 1918-23, 1948-53, 1959-1987.

Ilmestyy kuusi kertaa vuodessa. Utkommer sex gånger i året. Aperas sesfoje jare.

**Toimitus/Redaktion/Redaktejo:** *Aimo Rantanen*

PL 2, 40801 Vaajakoski. ☎ (014) 261 438 ✉ esperantolehti@esperanto.fi

Taitto/Layout/Enpaĝigo: *Ilkka Santtila*

Tollinpolku 1 B 21, 00410 Helsinki. ☎ (09) 530 1804 ✉ ilkka.santtila@esperanto.fi

**Tilauhinta/Prenumerationspris/Abonprezo:** 80 mk/vuosi/år/jaro;

Jäsenille/ För medlemmar/ Por membroj: 60 mk; Baltio 60 mk, aliaj landoj 80 mk.

**Tilaukset, osoitteenmuutokset/Abonoj, adresŝanĝoj:**

Suomen Esperantoliitto, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki. ☎ (09) 715 538

Prenumerationer, adressförändringar: EAF, Broholmmsgatan 15 C 65, 00530 Helsingfors.

Postisiirtotili/Postgirokonto/Poŝtĝirkonto: 800017-230825.

Julkaisija/utgivare/eldonanto: Suomen Esperantoliitto – Esperanto-Asocio de Finnlando.

Painosmäärä/Eldonkvanto: 400

## Esperanto-Asocio de Finnlando ♦ Suomen Esperantoliitto

Fondita/Perustettu/Grundad: 1907

**Prezidanto/Puheenjohtaja:** *Jukka Laaksonen*

Uudenkylänkuja 2 B 11, 33530 Tampere. ☎ (03) 255 4724; (050) 5829 248; työ/laboro: (03) 249 3313

**Vicprezidanto/Varapuheenjohtaja:** *Seija Kettunen*

Keihäsmiehenkatu 3, 40630 Jyväskylä. ☎ (014) 254 609 ✉ kari.kettunen@pp1.inet.fi

**Sekretario/Sihtööri:** *Päivi Saarinen*

Ruorimiehenkatu 5 C 23, 02320 Espoo. ☎ (09) 813 3217 ✉ paivi.saarinen@iki.fi

**Aliaj estraranoj / Hallituksen muut jäsenet:**

*Tiina Oittinen*, Puutarhakatu 26 A 11, 20100 Turku. ☎ (02) 230 5319 ✉ tiina.oittinen@pp.inet.fi

*Aimo Rantanen*, Haapalammentie 13 as 6, 40800 Vaajakoski. ☎ (014) 261 438 ✉ esperantolehti@esperanto.fi

*Anna Ritämäki*, Dragsfjärdsvägen 690, 25700 Kimito. ☎ (02) 423 146 ☎ (02) 423 246 ✉ aritamak@ra.abo.fi

*Ritva Sabelli*, Pietarinkatu 10 D 27, 00140 Helsinki. ☎ (09) 635 902 ✉ ritva.sabelli@sfs.fi

**Vicestraranoj/Varajäsenet:**

*Jussi Jäntti*, Huuhankatu 14 B 8, 70600 Kuopio. ☎ (0400) 859 641

*Markku Saastamoinen*, Siukolantie 9 H 12, 33470 Ylöjärvi. ☎ (03) 348 4245 ✉ markku.saastamoinen@koti.tpo.fi

*Aini Vääräniemi*, Vääräjärventie 26 A, 93590 Vanhala. ☎ (040) 518 7242 ✉ aini.vaaraniemi@pp.inet.fi

**Rahastonhoitaja/Kasisto:** *Antti Mikkola*

Ruorimiehenkatu 5 C 23, 02320 Espoo. ☎ (09) 813 3217 ✉ antti.mikkola@orion.fi

Postisiirtotili/Poŝtĝirkonto: 800017-230825.

**Toimisto/Officejo:** Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki, avoinna tiistaisin klo 17-19.

☎ (09) 715 538 (puh.vastaaaja/automata respondilo). Malfermita: marde 17-19-a horo.

**UEA:n pääedustaja / Ĉefdelegito de UEA:** *Heta Kesälä*

Kalamiehenkuja 3 D 32, 04300 Tuusula. ☎ (09) 275 5528

Postisiirtotili/Poŝtĝirkonto: 800029-19438647 (maksut UEA:lle/ pagoj por UEA).

**Internet:** <http://www.esperanto.fi>

## Esperanto faras tion jene

La historio de Esperanto-movado enhavas diversajn epokojn, kies klasifiko dependas de la vidpunkto. Mi ne volas ĉi tie ripeti iun ajn tian dividon. Por konatigi la lingvon – kiu estas la ĉefa kialo agi en la movado – oni devis kaj devus sekvi la ĝeneralan evoluon de la socio, en kiu ni vivas. Ĉar sen sciante ŝanĝi la agadmanierojn laŭ la ĝeneralaj sintenoj de la homoj ni simple fariĝos nealloga kaj malnova movado.

Vi certe diras, ke vi ja sciis tion kaj mi ne dubas, ke vi scias. Ĉiuokaze mi opinias, ke de tempo al tempo ni devas memori nin mem por pensi tion. Jam malnova proverbo diras: ”tempora mutantur et nos mutamur en illis” (tempoj ŝanĝiĝas kaj ni ŝanĝiĝas en ili). La demando do estas: kiel ni ŝanĝiĝu? En sia multe pridiskutita verko Ziko Sikosek faligas nin surteren de la helruĝaj mitaj nuboj pri Esperanto. Estas tre sanige iam sperti tian faligon por poste pli bone kompreni, kie ni vere staras. Ofte ni ja emas forgesi la diferencon inter realo kaj revo dum nia agado. Dum la pasint-aŭtuna informada seminario ni multe diskutis pri la bezonoj renovigi niajn informadajn praktikojn

klopodante havi kiel eble plej realisman vidpunkton kaj mi kredas, ke naskiĝis io nova kaj bona, kiu poste nur estu efektiva.

Hodiaŭ oni multe parolas pri tio, ke utilo estas tro emfazata kialo por fari kion ajn. Sed estas ja vero, ke nur malmultaj volas lerni fremdan lingvon pro nura scivolemo. Plej multaj almenaŭ subkonscie atendas, ke ili havos ian utilon pere de la lingvo. Ni sciuj scias, ke Esperanto montris certajn utilojn al ni. Restas do nia tasko montri, ke indas scii paroli kaj skribi Esperanton. Almenaŭ ni finnoj estas tre skeptismaj rilate al novaj opinioj, aĵoj ktp., kiujn iu alia propagandas. Tial eble la plej bona maniero konatigi Esperanton en nia socio estas videbli kaj montri, kion Esperanto povas fari. Grave estas krome memori, ke ĉiam el multaj semoj metitaj nur kelkaj sukcesas.

Unu grava elpaŝo al bona direkto estas la venontsomera KEF 2000, okazonta meze de la ĉefurbo. Mi esperas, ke per tiatipaj aranĝoj nia movado plifortiĝos kaj vastiĝos. Ni ĉiuj kunagadu laŭ niaj eblecoj por sukcesa kaj videbla KEF en Helsinko.

*Jukka Laaksonen*

### ESPERANTOLEHTI

ilmestyy vuonna **2000**  
aperas dum la jaro

Nro	Deadline/ limdato	Ilmestyy/ aperas
3	15.5	1.6
4	15.7	1.8
5	15.9	1.10
6	15.11	1.12

Avustajien toivotaan noudattavan edellä esitettyjä aikoja. La redakcio esperas, ke helpantoj atentu la datojn supre.

#### Ilmoitushinnat

Ulkopuoliset mainostajat:	Jäsenet:
1/1 sivu 600 mk	1/1 sivu 300 mk
½ sivua 400 mk	½ sivua 200 mk
1/4 sivua 250 mk	1/4 sivua 125 mk

## Prezidento, M.A. kaj broŝuro

Nun ni finnlandanoj havas novan ŝtatan prezidenton, Tarja Halonen. Ŝi ne estas nur la unua prezidentino en la longa vico de prezidentoj viraj, sed ankaŭ amiko de ne-registaraj organizoj, NRO-j (kansalaisjärjestö), kaj speciale de tiuj organizoj kiuj agas por homaj rajtoj.

Nun estas tempo por la nova prezidento reaĉeti balotpromesojn. Estus bone vidi apud registaraj kaj ŝtataj funkciuloj ankaŭ reprezentantoj de ne-registaraj organizoj. Tiel la ŝtato agnoskus gravecon de ilia ofte nehonorigita laboro kiel donanto de ideoj por oficiala politiko kaj ties kompletiganto. La ŝtato, kvankam ĝi laboras sur vasta kampo de nia finna socio, ne povas fari ĉion farendan pro rigidaj organizstrukturoj kaj ofte pro monmanko.

Post longa tempo ne estis reprezentantoj de finna Esperantomovado ekzemple en la Balo de Sendependectago. La reprezentanton Esperanto-asocio de Finnlando povus mem proponi al kancelario de la Ŝtata Prezidento. Kiel reprezentanton de nia movado oni povus elekti personon, kiu multe laboris por nia movado tiel, ke ankaŭ ekstera finna socio tion rimarkis.

La plej renoma finna esperantisto, M.A. Numminen havis antaŭ nelonge sian 60an naskiĝtagon. Li estas piediranta kulturhistorio de 60aj jaroj, popolartisto, kantisto, komponisto, verkisto, redaktoro ktp. Lia lasta libro *Helsinkiin: Opiskelija Juho Niityn*

*sivistyshankkeet 1960-1964* priskribas nostalgie kaj humure la situacion de artoj kaj popularmuziko en la komenco de 60aj jaroj kaj evoluon de unu intelektulo dum tiuj honorindaj jaroj, kiam Finnlando evoluis el agrara socio kiel internacie respektatan modernan industriŝtaton.

M.A. Numminen komponis kantotekstojn ankaŭ en Esperanto. *La deklaracio pri homaj rajtoj*, kiun kantis Päivi Paunu kaj la kanto *Kun mia virino en la parko de nia parlamento*, kiun M.A. mem prezentis. La pli maljuna generacion la voĉo de M.A. incitis, sed li trovis subtenon inter gejunuloj. Tiatempe oni treege volis emfazi ke ekzistas abismo inter generacioj.

Laborkunveno por prepari ĝeneralan broŝuron al Esperanto-asocio de Finnlando okazis dimanĉon la 12an de marto en la Oficejo de EAF. Ni laborgrupanoj volis fari broŝuron laŭ franca antaŭbildo. Ĝia celgrupo estas 15 ĝis 30-jaruloj. Unuopaj laborgrupanoj plendis, ke ili havus nenion komunan kun 15-jaruloj.

Ni diskutis la aferon kaj trovis kiel eblan solvon la humuro. Kiel portantan temon ni elektis post longa pripensado la temon kiun la prezidanto de nia laborgrupo, Riitta Hämmäläinen, jam dum la Informada Seminario en Jyväskylä lastan novembron proponis: Al kio oni povas uzi Esperanton? Nun la broŝuro atendas tralegon kaj rimarkigojn de ne-esperantistoj kaj poste enpaĝigon. Ni volis

fari broŝuron por la bezonoj de ĝuste la nuntempo, tial ni devis profunde pripensi kaj la grafikan aspekton de la broŝuro kaj mem la portantan temon.

*Aimo Rantanen*



*La humura laborgrupo de broŝurprojekto planas broŝuron por la 15-30-jarula celgrupo.*

## La kovrilbildo kaj "Esperanto sen Zamenhof"

Mi ricevis post la apero de Esperantolehti 1/2000 du leterojn al redakcio. En la unua letero la leganto esprimis, ke la kovrilbildo ne estis en la unua numero ĉijara sufiĉe deca por tiel estimata organo kiel Esperantolehti. La bildo estas emblemo por KEF, kiun oni aranĝos ĉijare en Helsinko 17.-23.7. Oni prenis la emblemon ankaŭ en tiel honorindan organon kiel Revuo Esperanto. La organizantoj de KEF havas junan celgrupon kaj juneca estas ankaŭ la emblemo por trovi aliĝantojn.

En la dua letero la leganto volis pli aferojn koncerne la Internan ideon de Esperanto. Mi volis vekti diskuton pri la Informada Seminario kaj ties rezultoj kaj elektis por la ĉefartikolo titolon eble tro provokan. Ŝajnas ke la Informada Seminario ŝanĝis ion en nia movado, kaj tiel la diskutado pri ties rezultoj estas nepra. La diskutado pri tiel bazaj aferoj por nia movado estas vojo demokrateca.

Fakte neniu volas subtroni Zamenhofon. Ni nur volas senpolvigi lin el eble tro emfazita Majstro-kulto. Ni ne volas do antaŭenigi iun religion koncerne Zamenhofon, sed nur diligente studi lian lingvon, aŭ ne?

*Aimo Rantanen*

## Mesaĝo de Lasse Kivistö

Por pliaktivigi niajn infanojn, la knabo: 15-jara kaj la knabino: 13-jara, ni gastigos 12-17 jaraĝan finnan infanon, kiu scipovas Esperanton, en nia Esperantista familio dum unu monato aŭ laŭ konsento. Nia reta adreso: <projencil@networld.com.br>.

## Suomen esperantoliiton talvipäivät Rovaniemellä 18.-19.3.2000

Noin 45 esperanton harrastajaa oli kokoon-  
tunut tämänvuotisille talvipäiville Rovanie-  
mellä. Pari päivää ennen talvipäiviä varoi-



*Vieraita Norjasta ja Pohjois-Venäjältä. Aleksandras J. Masjukas harmonikkoi-  
neen Murmanskista ja Bård Hekland Ber-  
genistä. Tällä hetkellä Bård tekee työtä  
Petroskoissa. Kansainvälisessä seurassa  
Suomen esperantoliiton uudelleen valittu  
puheenjohtaja Jukka Laaksonen.*

tettu veturimiesten lakko peruuntui, mikä  
saattoi hiukan vaikuttaa osallistumismää-  
rään. Ilahduttavaa oli pohjoisen ihmisten  
suuri osuus talvipäiväyleisöstä. Teitte niis-  
tä todella raikkaat ja tunnelmaltaan mieliin-  
painuvat. Kiitos teille. Samoin kiitän taival-  
koskelaista Anja Vääräniemeä, joka oli tuo-  
nut mukaan ison joukon hyvin nuoria osal-  
listujia Helmiporo-projektin edustajina tal-  
vipäiville.

Lauantaina tutustuimme Arktikum-kes-  
kuksen arktisten kansojen esineistöä esitte-  
leviin näyttelyihin. Kuten saamenpuku on  
saanut vaikutteita kaikilta ilmansuunnilta,  
jopa Bysantista, on Saamenmaa ollut aina  
kansainvälistä seutua, jossa merkityillä val-  
takunnanrajoilla ei ole ollut kanssakäymis-  
tä ehkäisevää merkitystä. Lappi on ihan oma  
maailmansa ja usein sangen löyhästi riippu-  
vainen meidän etelän ihmisten maailmasta.

Hotelli Oppipojassa saimme vastaanottaa  
yllätysvieraan: Esperanton maailmanliiton  
Keskustoimiston johtajan, Osmo Bullerin.  
Lauantai-iltapäivällä käsitelimme tiedotta-  
mista ja Barentsinmeren yhteistyötä. Jälkim-  
mäisestä käyty keskustelu johti yhteiseen  
julkilausumaan. Kuuntelimme Jorma Lis-  
teen esityksen Mainonnan perusasioista ja  
Pekka Välimäen seikkaperäisen luennon  
Enontekiön lukiossa pidetystä esperanto-  
kurssista, johon vuonna 1998 osallistui 15  
opiskelijaa.

Kurssin aikana kävi ilmi, ettei esperanton  
opiskelua voi motivoida idealistisin tai hu-  
manistisin päämäärin, sillä lukiolaiset ovat  
pragmatikkoja ja pyrkivät löytämään opis-  
kelemastaan aineesta jotakin hyötyä. Tänä




***Talvipäivillä haukiputaalainen Erkki Röntynen esitteli sananlaskukokoelmansa taustatyötä. Piirros: Anna-Mari Orava.***

keväänä Pekka Välimäki on vetänyt esperanto-kerhoa. Ensi vuonna ilmeisesti on taas Enontekiön lukiossa esperantokurssi. Illalla Erkki Röntynen kertoi Proverbaro-kirjansa synnystä. Tuo syntiprojekti oli Röntynsen perheen yhteinen yritys, johon innoituksen antoi Puolan Radion toimittajan Ewa Krachin sananlaskukeräys maisterintyötä varten. Synnytysapua antoivat folkloristit Matti Kuusi ja Outi Lauhakangas. Kätilönä Proverbaro-kirjalle toimi Raita Pyhälä.

Sunnuntaina oli Suomen esperantoliiton vuosikokous. Puheenjohtajana jatkaa Jukka Laaksonen. Hallituksen jäseniksi valittiin Tiina Oittinen vuodeksi 2000 Anna-Liisa Ali-Simolan paikalle sekä Aimo Rantanen, Päivi Saarinen ja Ritva Sabelli vuosiksi 2000-2001. Varajäseniksi valittiin Jussi Jäntti, Markku Saastamoinen ja Aini Vääräniemi. Tilintarkastajiksi valittiin Erkki Kempainen ja Heta Kesälä. Varatilintarkas-

tajiksi valittiin Eila Martin ja Marja-Liisa Parpala. Hallituksen järjestäytymiskokouksessa Suomen esperantoliiton varapuheenjohtajaksi valittiin Seija Kettunen, sihteeriksi Päivi Saarinen, rahastonhoitajaksi Antti Mikkola ja kirjanpitäjäksi Päivi Saarinen.

*Aimo Rantanen*



***Yllätysvieras Rotterdamista Esperanton maailmanliiton keskustoimiston johtaja Osmo Buller oli mukana Rovaniemen talvipäivillä.***

## Noveloj el Koreio

*Korea Antologio de Noveloj*

*Kompilis Cho Sung Ho/ Kim Uson, 339 paĝoj*  
*Korea Esperanto-Asocio, 1999.*

Estas agrable havi la libron enmane: la glataj kovrila kartono kaj paĝoj plaĉas al la tuŝo. Sur la unua kovrilo malgranda kolorbildo pri iu korea vilaĝo kun tradicia arkitekturo kaj verdaĵoj. Ĉio ŝajnas neta kaj zorgeme primeditita. "Apreco de noveloj servas por profundigi komprenon de la kulturoj kaj sentoj de aliaj nacioj," diras Lee Chong-Yeong en la Antaŭparolo. Koreoj delonge deziris montri sian noveltrezoron al la mondo, kaj nun, kun la financa subteno kaj laborego de multaj personoj, aperas ĉi tiu antologio, kies noveloj kovras duonjarcentan socian evoluon kaj reprezentas 26 aŭtorojn kaj 14 tradukistojn. (Unu nefinita novelo estas originale esperanta.) Tial la enhavo de la antologio estas riĉa kaj la stiloj variaj.

La plej malnovaj noveloj, de la 1920aj jaroj, spegulas la suferigan mondon de malriĉaj, simplaj homoj, kiuj eĉ ne scias, kiel mildigi la sorton unu de la alia. Sekvas du tri rakontoj en lirika prozo pri iom pli feliĉaj kondiĉoj kaj la beleco de la kamparo, la tenero inter homoj. Poste, pere de la vivo de la prirakontataj familioj kaj individuoj, la leganto konatiĝas kun la reflektoj de la Korea Milito, la konflikto inter politikaj ideologioj. La lastaj noveloj pritraktas la 1970ajn jarojn.

Kun granda intereso kaj emocio mi tralegis la antologion, po 1-3 noveloj vespere. La traduko preskaŭ ĉiam senpene fluas, sed la enhavo de la rakontoj tiom pezas kaj pensigas, ke ne eblas rapide transiri de la etoso de unu al tiu de alia. Pluraj sortoj vere korduŝis min: unuflanke la malmildecigo inter ge-

edzoj/familianoj, la mizeraj materialaj kondiĉoj (mono!), aliflanke la amikeco kaj solidareco inter homoj, la ĉiutagaj klopodado kaj laborŝarĝo, la beleco de la naturo al ni ekzotika.

La kompilintoj avertas, ke la lingvaĵo de iuj tradukaĵoj eble ne atingas decan nivelon, sed mia opinio la lingvaĵo estas klara kaj kelkloke eĉ ĝuebla. Kompreneble oni ĉiam povus proponi ŝanĝojn, kaj kelke da preseraroj povas okazi, sed malmultaj. Nur unu el la noveloj al mi estis lingve iom rigida. (Tipe koreajn manĝaĵojn, plantojn kaj religiajn nociojn ni neniel povas rekoni, kvankam iom helpas la eksplikoj.) Ĉion konsiderante, mi vere esperas, ke la Korea Antologio de Noveloj estos legata kaj ĝuata de kiel eble plej multaj esperantistoj, kaj kiam estos konata ĝia valoro, aperos dua eldono, ĉar la nuna konsistas nur el 500 ekzempleroj.

*Saliko*

## Edukado al toleremo kaj respekto de diverseco

*Paĉjo, kio estas rasismo*

*de Tahar Ben Jelloun, 52 p., UEA 1999*

*Tradukis Armela LeQuint kaj Ĵak Le Puil*

Kiel respondi embarasajn demandojn pri rasismo, antaŭjuĝoj, klonado, antisemitismo, genocido, etno, sklaveco, koloniismo, apartismo? Tiuj vortoj ja estas ne nur malfacilaj vortoj sed enhavas penigajn erojn el la historio de la homaro, hontindajn sed ne neniigebajn. La infanoj, kiuj aŭdas tiajn vortojn en la novaĵoj kaj konversacioj, volas ekkompreni kaj demandadas. Kion respondi al ili kaj kiel ekspliki?

La aŭtoro, patro de 4 infanoj, diskutas kun sia 10-jara filino kaj ŝiaj samlernajanoj. Li



respekteme aŭskultas iliajn demandojn kaj pacience eksplikas la historion kaj nunajn okazantaĵojn per plej eble simplaj vortoj kaj propozicioj. Li lasas ilin pludemandi kaj influi. Li prenas siajn ekzemplojn el la ĉiutaga vivo en Francio, kie la lernejoj klasoj ofte konsistas el enmigrintoj el diversaj mondpartoj kaj el parolantoj de diversaj lingvoj.

La libro meritis esti tradukita en ĉiujn lingvojn, por ke plej eble multaj infanoj profitu de ĝi. Adolton la Esperanto-traduko helpas almenaŭ lingve. La franclingva originalo, aperinta antaŭ 3 jaroj, jam fariĝis enorme populara.

”Sciu ke ĉiu vizaĝo estas miraklo. Ĝi estas unika... Ĉiu vizaĝo estas la simbolo de la vivo. Ĉiu vivo meritas respekton. Neniu rajtas humiligi alian personon... Kiam oni respektas estaĵon, oni faras, tra li, omaĝon al la vivo, al ties belo, mirindeco, diferenco kaj neatenditeco.”

La libro estas havebla ankaŭ en la retbutiko de Flandra Esperanto-Ligo, adreso <retbutiko@fel.esperanto.be>, prezo EUR 6,50 + afranko.

R.P.

## Korespondi deziras

Du ĉehaj fraŭlinoj (35-jara kaj 40-jara) deziras korespondi kun finnaj viroj. Liaj hobiaj estas krom Esperanto, kulturo, muziko, turismo kaj lingvoj. Kontaktadreso: Alice Dudova ecz.danzas.com, Svazacka 9, OSTRAVA 3 70030, Czech Republic

Fraŭlino (22-jara) Katarzyna Jakubowska, ul. Poznańska 87/8, PL-87-100 Toruń, Pollando, volas korespondi kun samideanoj pri ĉiuj eblaj kaj decaj temoj pere de Esperanto, kiun ŝi tre ŝatas.

## *Tango sur la maro*

*(Tango merellä)*

*Tango sonas sur mar',  
en memor' iras mi  
en hejmlandon kaj al amatin'.  
Tango sonas sur mar'  
pensas mi pri patri',  
en la vento salutas vi min.  
Dum ekiro al ĉi vetur'  
'vi revenu' vi flustris nur.  
Tango sonas sur mar'  
flugas mia pensar'  
en hejmlandon kaj al amatin'.*

*Ŝip' kun ŝaumo ĉeprue  
plugas tra onda krest'.  
Milda vento senskue  
blovas el nord-uest'.  
Sur serena ĉielo la steloj  
brilas samkiel jam en pratemp'.*

*Tango sonas sur mar'  
kaj min portas sopir'  
tien, kie atendas knabin'.  
Tango sonas sur mar'  
ekis jam longa ir'  
kiu hejmen al ŝi gvidos min.  
Estas kvazaŭ ke el stelar'  
min rigardus okula par'.  
Tango sonas sur mar'  
kaj min portas sopir'  
tien, kie atendas knabin'.*

*Teksto: Reino Helismaa  
Traduko: Anja Karkiainen*

## Uhuu, onko U?

Verbin u-päätteen käsittelyyn tuskin koskaan ehditään lyhyillä kursseilla. Hyvä jos saadaan selvitettyksi, että se on käsky- ja pyyntömuodon päätte.

*Memoru!* Muista! Muistakaa! *Ne forgesu!* Älä unohda! Älkää unohtako! *Ni iru hejmen!* Mennään kotiin! *Ni ne parolu pri tio!* Ei puhuta siitä! *La infanoj enlitiĝu!* Lasten pitää mennä nukkumaan/ Lapset menkööt vuoteeseen!

Itseäänkin voi komentaa tai rohkaista: *Mi telefonu al ŝi!* Minun pitää soittaa hänelle. *Mi ne plu hezitu!* En saa enää epäröidä.

Voi myös kysyä toisen tai sisimpänsä mielipidettä: *Kion mi faru?* Mitä minun pitäisi tehdä? *Ĉu mi diru al ŝi, ke mi amas ŝin?* Sanonko hänelle, että rakastan häntä? *Kie ni renkontiĝu?* Missä tavataan, mikä olisi sopiva paikka? *Kiujn/Kiajn florojn ni aĉetu?* Mitä/millaisia kukkia meidän pitäisi ostaa?

Voi kertoa, että on saanut pyynnön tai käskyn: *Mi ĵus ricevis sciigon, ke mi tuj telefonu hejmen.* Sain juuri tietää, että minun pitää heti soittaa kotiin.

Käsky- ja pyyntömuodoissa usein mielellään lisää ”ole hyvä” tai ”voisitko ystävällisesti”. Silloin u-muoto on itse tässä kohteliaisuudessa, mutta sen jälkeen on i-muoto: *Bonvolu telefoni al mi!* Olkaa hyvä ja soittakaa minulle! *Bonvolu ne telefoni post la 22a!* Älä soita 22:n jälkeen, ole kiltti!

(Voisi kyllä sanoa myös: *Estu tiel afabla kaj telefonu antaŭ la 22a!*)

U-muodon kieliopillinen nimi on volitiivi. Se liittyy aina jotenkin tahtomiseen (*voli*), haluamiseen (*deziri*), ehdottamiseen (*pro-*

*poni, sugestu*), vaatimiseen (*postuli*), määräämiseen (*ordoni*), pyytämiseen (*peti*) tai neuvomiseen (*konsili*). Näitä verbejä seuraa yleensä u-muoto. Sen käyttö ei riipu siitä, miten asia suomeksi sanotaan, vaan edellä olevasta ajatuksesta. Kaikki kolme seuraavaa lausetta kääntyvät yhdellä tavalla:

Hän tahtoo että menisin sinne.

Hän tahtoisu että menisin sinne.

Hän tahtoo minun menevän sinne.

=> *Li volas ke mi iru tien.*

Myös konjunktoiden *por ke* (jotta) ja *tiel ke* (niin että) jälkeen on u-muoto: *Ili parolas malrapide, por ke ni komprenu.* He puhuvat hitaasti, jotta ymmärtäisimme. *Kuracistoj skribu tiel, ke ĉiu povu legi.* Lääkärit kirjoittakoot niin, että jokainen saa selvää.

Volitiivi voi ilmaista myös mielipidettä, mutta silloinkin on kyse ikään kuin neuvon tai käskyn antamisesta:

*Estas grave, ke vi abonu Esperanto-gazetojn.* On tärkeää, että tilaatte E-lehtiä. (Ihminen, jolle näin sanotaan, ei ole vielä tilannut, ja häntä kehoitetaan tilaamaan.)

*Estas grave, ke vi abonas Esperanto-gazetojn.* Hyvä että tilaatte E-lehtiä. (Lehtiä tulee jo, ja se on hyvä, siitä kiitetään.)

Vertaa seuraavia tilanteita ja yritä löytää ero:

A. *Ne konvenas, ke infanoj vidu ĉi filmon.* Lasten ei sovi nähdä tätä kuvaa (Sanotaan ennen kuin lapset ovat päässeet aloittamaan katselemisen.)

B. *Ne konvenas, ke infanoj spektas ĉi-filmon.* Ei sovi, että lapset katselevat... (Näin sanotaan, kun filmi on jo menossa ja lapset sitä katsomassa.)

## Interlingvistikaj Studoj en Poznan

La Universitato de Adam Mickiewicz (UAM, la dua plej granda universitato en Pollando) anoncas 3-jaran eksteran postdiplomian studadon pri interlingvistiko. Eblas aliĝi ankaŭ por la studjaro 2000/2001.

La internacia kurso okazas en la Lingvistika Instituto, sub la gvido de d-rino Ilona Koutny, membro de AdE kun la subteno de prof Tadeusz Zgółka. Inter la prelegontoj estas konataj esperantologoj, kiel profesoroj M. Duc Goninaz, H. Tonkin kaj J. Wells, d-rinoj V. Barandovska-Frank, K. Smideliusz kaj I. Ertl.

La interlingvistikaj studoj konsistas el enkonduko al ĝenerala kaj aplikata lingvistiko el internacia kaj interkultura komunikado, ili traktos planlingvojn kaj detale okupiĝos

pri gramatiko, literaturo, kulturo kaj historio de Esperanto. En la tria jaro eblas specialiĝi ankaŭ pri metodiko.

Surloka kurso (sesio) okazos unufoje dum la semestro (en septembro kaj februaro). La gestudentoj pretigos diplomlaboraĵon kaj post la fina ekzameno ricevos Atestilon pri Interlingvistikaj Studoj.

Postulo: fino de mezgrada lernejo (kun abiturienta ekzameno aŭ egalvalora) kaj bona scio de Esperanto.

Kotizo por unu semestro 400 USD. Por pluaj informoj kaj aliĝilo, kontaktu d-rinon I. Koutny: Lingvistika Instituto de UAM, ul. Miedzochodzka 3-5, PL-60-371 Poznan. <ikoutny@amu.edu.pl>

---

Tilanteessa A puhuja ikään kuin komentaa lapset ajoissa pois. Tilanteessa B hän paheksuu tilannetta, joka on jo syntynyt.

Volitiivilla voidaan ilmaista toiveita myös näin: *Ke ili venu baldaŭ!* Kunpa he tulisivat pian! *Ke Avinjo resaniĝu!* Kunpa Mummi parantuisi!

Pitää kuitenkin varoittaa *esperi-verbistä*. Sen kanssa luulisi käytettävän u-muotoa, mutta eipäs, vaan futuuria tai preesensia.

*Mi esperas, ke vi partoprenos la kurson en Valamo. Mi esperas, ke Kielinurkka plaças al vi.*

*raita.pyhala@lestijarvi.fi*

### ***Plena lun'***

*(Täysikuu)*

*Plena lun', plej granda nokta mirindaĵo sur ĉiel'.*

*Plena lun', arĝentan veston havas spac' pro via hel'.*

*Rigardi amon rajtas vi kaj horojn de la ĝoj',*

*vagadi tamen sola devas laŭ la frida voj'.*

*Plena lun', trovante ŝin, pri kiu pensas mi sen ĉes'*

*Plena lun', per via brilo kovru ŝin per kis-kares'*

*kaj prirakontu mian grandan amon al ŝi nun.*

*Plena lun', al ŝi rakontu, plena lun'!*

*Teksto: Reino Helismaa*

*Traduko: Anja Karkiainen*

## Volontuloj serĉataj

Pro Esperanto serĉas kunlaborantojn kiuj volontule (sensalajre) deziras labori kelkan tempon ĉe ni en Ali-Seppälä bieno.

Ni faras ekologiajn artaĵojn, diversajn konstrulaborojn kaj laboras en arbaro kaj ĝardeno. Ankaŭ vendejon por malnovaj objektoj ni malfermos ĉisomere.

Kontaktu Börje Eriksson se vin interesiĝas tiatipa agado en Orimattila ĉisomere.

Pro Esperanto ry., Keiturintie 274, 16510 Luhtikylä. Puh. (03) 785 1191. <esperanto@dlc.fi>

## La dua internacia fotokonkurso

”La Ondo de Esperanto” kaj Urala Esperantista Societo (UES), post la sukceso en 1998, organizis en 1999 la duan internacian fotokonkurson. La konkurso ne estis ligita al deviga temo. En la konkurso partoprenis 43 fotoverkoj de 17 aŭtoroj el 11 landoj: Belgio, Ĉeĥio, Finnlando, Francio, Germanio, Hungario, Jugoslavio, Kroatio, Ruslando, Ukrainio kaj Urugvajo.

3an premion (abono al ”La Ondo de Esperanto”) ricevis Harri Melasniemi (Finnlando) pro ”Eta arbo”. Laŭdan mencion ricevis Irja Melasniemi (Finnlando) pro ”Kvieta maro”.

## Tutmonda fabelkonkurso al infanoj

La Instituto de Päätaalo en la komunumo de Taivalkoski estas edukcentro por verkistoj en Norda Finnlando. La Instituto aranĝis fabelkonkurson al finnaj infanoj ĉiujare jam ekde la 1994-a jaro.

Metsäkylä estas unu vilaĝo en la komunumo de Taivalkoski.

La Instituto de Päätaalo kaj la Vilaĝasocio de Metsäkylä proklamas nun tutmondan Esperantlingvan fabelkonkurson al ĉiuj infanoj kiuj jam scipovas aŭ nur studas Esperanton.

La kategorioj en la konkurso estas: A: ĝis 9-jaraj; B: 9-10 jaraj; C: 11-12 jaraj. La konkursfabelo povas esti kiel ajn mallonga, sed povas ampleksi maksimume tri tajpitajn paĝojn.

La rezulton de la fabelkonkurso oni publikigos kaj anoncos fabeltage, samtempe kun la rezultoj de la finnlingva fabelkonkurso, dum infansemajno, kiun oni aranĝas en Taivalkoski en la oktobro 2000.

La limdato estas la 30-a de junio 2000. Bonvolu sendi viajn fabelojn por la konkurso al la jena adreso: Instituto de Päätaalo, PL 39, FI-93401 Taivalkoski, Finnlando.

Bonvolu skribi sur la koverto la vorton ”Fabelkonkurso”. Retadreso: <instituuutti@taivalkoski.fi>, <<http://www.taivalkoski.fi/paatalo-instituutti>>.

Pli da informoj estas haveblaj ĉe: Aini Vääräniemi, Vääräjärventie 26 A, FI-93590 Vanhala, Finnlando. Retadreso: <aini.vaaraniemi@pp.inet.fi>.

## Esperanto@Interreto

Seminario pri Interreto kaj ĝiaj teknikoj.

Programpunktoj: ♦ Interretaj teknikoj (HTML, FTP, IRC ktp.) ♦ Diskuto: strategio pri Esperanto ĉe Interreto ♦ Iloj kaj teknikoj por krei ttt-bildojn ♦ Kiel informi plej efike en Interreto? ♦ Diskuto pri komputilaj terminoj en Esperanto ♦ Skript- kaj programlingvoj por ttt-paĝoj ♦ Lingvokursoj ttt-aj; kio troviĝas; kion eblas fari ♦ Konkurso: kiu faras la plej bonan hejmpaĝon?

Praktikaj informoj: ♦ Kvintaga seminario en Stokholmo, Svedio ♦ Dum Pasko 2000 (16-

22 de aprilo) ♦ Laborgrupoj kaj prelegoj je diversaj niveloj ♦ Kunlaboro inter la ĉe-Baltmaraj landoj ♦ Aranĝantoj: LEJL, SEJM kaj SEJU ♦ TEJO subtenas la projekton ♦ Bona ŝanco spertiĝi pri ttt kaj Interreto! ♦ Komenco de pli granda ttt-projekto.

Seminarigvidantoj: ♦ Dovile Dimindaviciute (HTML, Grafikado) ♦ Anna-Leena Eriksson (Kasisto, Distra programo) ♦ Ralf Frölich (Strategioj pri Esperanto Interrete) ♦ Nastia Kojevnikova (Distra programo) ♦ Janko Luin (HTML, Grafikado, CGI) ♦ Hokan Lundberg (HTML, Javo, JSP) ♦ Bertilo Wennergren (HTML, CGI, Javaskripto).

## Kondiĉoj

Post la sukceso pri senkosta programo dum KEF-98 ni denove invitas al aranĝo kun senkosta programo! Ĉefe ni invitas junulojn de ĉe-Baltmaraj landoj. A-landanoj pagu 40 • kaj B-landanoj 15 • por loĝado, manĝo kaj kurslibreto pri Interreto kaj ttt-verkado. Ni ankaŭ esperas povi doni iom da vojaĝmono al homoj kiuj bezonas tion! Estas nur 25 partoprenantlokoj, do rapide aliĝu por pli granda ŝanco ricevi eblecon veni al ĉi tiu inda kaj interesa seminario!

ttt-paĝo: <<http://sites.netscape.net/Ecxel>>  
<<http://w1.871.telia.com/~u87101714/echei/>>

## Tagoj de Kievo – ĝemelurbaj kontaktoj

Inter 25-29 de majo okazos granda urba festo "Tagoj de Kievo" kun partopreno de plurmil turistoj, vizitantoj.

Ukrajna E-Asocio serĉas kontaktojn al esperantistoj de la ĝemelurboj en Krakovo, Bratislavo, Toulouse, Leipzig, München, Moskvo, Tampere, Kioto por prizorgi la

partoprenon de esperantistoj. (Kompreneble ne nur ili, sed iu ajn povas partopreni la festojn).

Informilojn petu de Mihail Lineckij, a/ja 4, UA-254200 Kiev-200, Ukrainio. Rete: <[lineckij@esperanto.nu](mailto:lineckij@esperanto.nu)>, <[ua\\_esperanto@mail.ru](mailto:ua_esperanto@mail.ru)>.

*(Retinfo)*

## LIRO-2000

Post la sukcesaj konkursoj "Liro-97", "Liro-98" kaj "Liro-99" Urala Esperantista Societo (UES) kaj la redakcio de "La Ondo de Esperanto" invitas ĉiujn dezirantojn partopreni en "Liro-2000".

Kadre de "Liro-2000" okazos kvar konkursoj.

1. "Originala prozo": ajnatema novelo kun amplekso ne pli ol 20 mil literoj (tajperoj)
2. "Originala poezio": la temo kaj amplekso ne estas limigitaj
3. "Traduka prozo" el la rusa lingvo: novelo de Anton Ĉeĥov "Sapogi"
4. "Traduka poezio" el la rusa lingvo: poemo de Sergej Jesenin "Ustal ja ĵitj v rodnom kraju..."

En ĉiu el la originalaj konkursoj oni rajtas partopreni per ne pli ol tri verkoj.

Bonvolu sendi tri tajpitajn, komputile kompostitajn aŭ tre klare skribitajn ekzemplerojn de la konkursaĵo ĝis la 1a de oktobro 2000 je la adreso RU-620077 Jekaterinburg-77, ab. ja. 67, Ruslando.

Subskribu vian konkursaĵon per pseŭdonimo kaj aldonu slipon kun indiko de la pseŭdonimo, aŭtenta nomo kaj poŝta adreso.

Oni ne rajtas sendi verkojn, kiuj jam estis publikigitaj aŭ premiitaj en aliaj konkursoj.

La laŭreatoj de "Liro-2000" ricevos diplomojn kaj libropremiojn. La rezulto estos

anoncita je la Zamenhofa Tago. La organizantoj rezervas al si la rajton ĝis la 31a de decembro 2002 publikigi la ricevitajn konkursaĵojn en "La Ondo de Esperanto", libroforme kaj elektronike, kondiĉe ke ili avertos pri tio la aŭtoron ĝis la 1a de februaro 2001.

Adreso: RU-620014, Jekaterinburg-14, p.k. 162, Ruslando. Telefono: (3432) 281 711. Retadreso: <sezonoj@mail.ru>, <http://www.sezonoj.itgo.com>.

---

### Korespondi deziras

Kiel kunlaboranto de UEA pri la agado en Afriko mi ekkonis novan korespondanton: MUHASA MUTETULWA wa Mahungu, kiu nun elektis la jenan adreson: c/o William Sampewi, P.O.Box 34, Uvinza, Kigoma, Tanzanio. Li estas Kongolandano, sed fuĝis (kiel centmiloj da aliaj) el tiu militregiono, kaj nun loĝas en rifuĝejo Lugufu en la provinco Kigoma de Tanzanio. Li venis en marto 1997, kaj neniu scias kiom da jaroj li devos ankoraŭ atendi sekuran revenon hejmen. Li nun kultivas la kampon. En Kongolando li estis naturkuracisto (eĉ prezidento de iu tia asocio). En Lugufu li (kaj aliaj) lernis Esperanton per la kurso de Radio Aŭstrio.

Nia amiko volas korespondi tutmonde. Li estas 42-jara, edzo, kaj laboris en Kongolando kiel naturkuracisto kaj elektronikisto. Li preferas korespondi kun esperantistoj pli aĝaj ol 50, kun landoj Nederlando, Finnlando, Belgujo, Rusujo, kaj precipe pri la temoj: sindikatoj, elektroniko, juro, evoluproblemoj, naturkuracado. La korespondado ne povas esti tre densa (do ne timu tro da tempoperdo), ĉar la poŝto ne rapidas en tiuj landoj.

*H. Bakker*

Kiu havus intereson korespondi kun mi pri Brazilo? <dinaandreami@paiol.com.br>

---

## Nekrologoj

Biblioteka amanuenco Selma Järvinen forpasis 8.11.99 en aĝo de 86 jaroj. Ŝi laboris pli ol 40 jarojn kiel bibliotekisto en la biblioteko de Lauritsala. Ĉiuj Lauritsala-anoj konis ŝin. Kiel esperantisto ŝi estis 50 jarojn, ŝi havis multajn diversnaciajn amikojn. Ŝi estis plurajn jardekojn delegito de UEA en Lauritsala. Al dudeko de UKoj ŝi partoprenis. Esperantistoj de Lappeenranta nomis ŝin "la animon de la loka klubo". La familio de Selma Järvinen elektis esperantlingvan version de la Psalmo 23. por la nekrologo en gazeto Etelä-Saimaa.

### Martti Peltonen estas for

La 18-an de novembro mortis instruisto Martti Peltonen post malfacila malsano. Li estis membro de la Esperanto-societo en Turku pli ol tridek jarojn kaj siatempe sindone agadis diversflanke por la societo, estinte ekzemple estrarano dum multaj jaroj. Pro sia bonanima, sincera karaktero Martti Peltonen gajnis respekton kaj simpatian de ĉiuj geamikoj. Ni perdis fervoran esperantiston kaj bonegan amikon. Esperanto-societo en Turku funebras pri lia forpaso kaj honoras la memoron de sia ĝis morto fidela membro.

---

## UMEA informas

Membrokotizo de Universala Medicina Esperanto-Asocio por ĉi-tiu jaro 2000 estas:

- ◆ 30 mk nura membreco
- ◆ 90 mk membreco kun la faka gazeto Medicina Internacia Revuo (du numerojn jare)

Membrokotizon pagu al poŝtĝironto 800 020-3612644, Arja Kuhanen, Hämeentie 5 A 20, 13200 Hämeenlinna (landa delegito de UMEA).

## Estraro kunvenis

La estraro de Esperanto-Asocio de Finnlando kunvenis la 15-an de januaro en Helsinko. La kunvenon partoprenis ĉiuj estraranoj kaj vic-estraranoj krom Kimmo Hakala, Markku Saastamoinen kaj Anna-Liisa Ali-Simola. La kunveno daŭris kvar horojn.

La estraro sciigis ke la domkompanio en kiu la oficejo situas, ŝanĝis sian disponenton. Anna Ritamäki sciigis, ke ŝi estas membro de laborgrupo, kiu ellaboros novan strategian planon por UEA.

La estraro diskutis pri la financa situacio de la asocio kaj pri eventuala okazigo de speciala seminario de la estraro pri financoj.

La estraro akceptis sian proponon por la aferlisto de la jarkunveno kaj diskutis pri la propono por agadplano. La agadraporto, financa raporto kaj buĝeto estos farita ĝis la sekva kunsido.

Al Vintraj tagoj en Rovaniemi aliĝis 20 personoj. La estraro diskutis pri la programo.

La estraro diskutis pri la plano por somera kurso en Valamo-monaĥejo kaj pri praktikaĵoj.

La Aŭtunaj tagoj 2000 okazos en Iitti kun temo sano kaj sanigado. En la programo estos praktikaj ekzercoj kaj prelegoj pri la temo, i.a. pri Vilho Setälä.

La estraro akceptis la inviton de Esperanto-klubo de Helsinko aranĝi la aŭtunajn tagoj 2001 en Hanko.

La estraro decidis traduki la resumon de la novembro seminario pri informado en Esperanton kaj sendi ĝin al UEA kaj kelkaj landaj asocioj. La laborgrupo pri nova broŝuro ankoraŭ ne kunvenis.

La estraro diskutis pri la neceso kampanji por ricevi subtenon de eŭroparlamentanoj por Esperanto (projekto kiun realigas Germain Pirlot) kaj decidis, ke ne estas necese partopreni en tiun kampanjon. La estraro konstatis, ke UEA ne havas strategian planon pri Eŭropo aŭ EU kaj konstatis, ke pro tio troa individuismo regas en tiu kampo.

La estraro decidis ne publikigi reklamon aŭ mapon de Finnlando en jarlibro.

La estraro diskutis pri la Eŭropa Esperanto-kongreso (Oostende, Aprilo-Majo) kaj decidis, ke se Anna Ritamäki partoprenos ŝi povas esti la oficiala reprezentanto de EAF.

La estraro de EAF kunvenis la 19-an de februaro en Helsinko. La kunvenon ĉeestis ĉiuj estraranoj kaj vicestraranoj krom Anna-Liisa Ali-Simola, Kimmo Hakala, Anna Ritamäki kaj Markku Saastamoinen. La kunveno daŭris 3 horojn kaj 10 minutojn.

La estraro informiĝis, ke la jarkunveno de FEJO okazos la 11-an de marto en Turku.

La estraro diskutis pri la aferlisto de la jarkunveno kaj pri jarkunvenaj dokumentoj. La estraro akceptis sian proponon por agadplano kaj buĝeto. La estraro diskutis pri agadraporto, kiu ankoraŭ ne estis preta. La estraro akceptis ankaŭ financan raporton. La estraro diskutis ankaŭ pri la praktikaj reparoj de la Vintraj Tagoj kaj jarkunveno.

La estraro diskutis pri venontaj aranĝoj, sed ne estis multe da nova por raporti.

La estraro informiĝis pri la propono fari kontrakton inter la asocio kaj Esperanto-klubo de Helsinko pri la uzo de la oficejo, sed ne faris decidojn.

---

## Helsingin esperanto-seura ry:n toimintaa

Illanvietto keskustelun ja oluen parissa

4.5. klo 18.00 ravintola Elitessä ja

8.6. klo 18.00 Tervasaassa.

27.5. Suunnitteilla kevätretki Suomeenlinnaan, lähtö kauppatorilta lautalla klo 10.00.

17.-23.7. Kultura Esperanto-Festivalo 2000. Esperantofestareit Helsingin esperantoseuran, Esperantoliiton ja esperantonuorten yhteistyönä.

## Jyväskylän esperantokerhon toimintaa

Kerhomme vuosikokous oli 27.2.2000. Puheenjohtajana jatkaa Aimo Rantanen ja sihteerinä Kari Kettunen. Varapuheenjohtajana toimii Pentti Makkonen ja rahastonhoitajana Seija Kettunen. Hallituksen muita jäseniä ja varajäseniä ovat Risto Jämsén, Norma Perälä, Terttu Tyynelä, Aimo Nikander, Heikki Veijanen, Aune Makkonen ja Jukka Pietiläinen. Marjatta Linjama valittiin uudeksi varatilintarkastajaksi.

Loppukevään ohjelma on seuraavanlainen:

7.5. Kalevalan viimeinen runo. Risto Jämsén.

(Tapaaminen pidetään Kyllikinkatu 1:ssä sijaitsevan Sepänkeskuksen huoneessa Protoni klo 14.00 alkaen.)

Kesällä kokoonnumme seuraavasti:

7.6. Tarinatilanne.

21.6. Tarinatilanne ranskalaisen Modesto Ramellin ryhmän kanssa.

Heinäkuussa ei tarinatilanteita.

2.8. Tarinatilanne.

16.8. Tarinatilanne.

30.8. Tarinatilanne.

(Kokoonnumme tarinatilanteita varten klo 16.30 Sokoksen kulmalle, josta jatkamme rauhalliseen tilaan yhteistä keskustelua varten.)

## Esperantoseura Antaüen ry:n toimintaa

Johtokunnan jäsenen tapaamiset NESTOssa, kerho-  
huoneessamme, jokaisena maanantaina klo 16-  
17, Satakunnankatu 30 C 6, FIN-33210 Tam-  
pere. Tule käymään, myös kesän aikana.

KEVÄTRETKEI. Vierailemme Tohlopissa TV  
2:ssa.

## Lahden esperanto- kerhon toimintaa

Kekusteluryhmät joka toisena keskiviikkona klo  
17.30 pääkirjaston kahvilassa, eli ainakin 19.4.  
Mahdollisesta jatkosta päätämme aktiivisuus-  
temme perusteella.

## Esperanto-Societo en Turku

### Jarkunveno

La unua laŭstatuta jarkunveno de la societo en  
la nova jarmilo okazis la 6-an de februaro 2000  
en konata Blua Salono de la Malnova Urbo-  
domo. Ĉeestis 15 societanoj, inter ili ĝojige unu  
nova membro.

---

## Suomen esperantoliiton jäsenjärjestöt

**Muutokset ja lisäykset osoitteistoon Aimo Rantaselle, PL 2, 40801 Vaajakoski, s-posti [esperantolehti@esperanto.fi](mailto:esperantolehti@esperanto.fi) mieluummin kirjallisena.**

Suomen Esperantoliiton paikallisyhdistykset toimivat:

- ♦ Helsingissä: Helsingin Esperantoseura / Esperanto-klubo de Helsinki, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki. ☒ Sakari Kauppinen, [sakari@skau.pp.fi](mailto:sakari@skau.pp.fi)

- ♦ Iisalmessa: Iisalmen Esperantoklubi / Esperantoklubo de Iisalmi, (Onni Kauppinen) Uudispihantie 298, 74100 Iisalmi
- ♦ Jyväskylässä: Jyväskylän Esperantokerho / Esperantoklubo de Jyväskylä, (Aimo Rantanen) PL 2, 40801 Vaajakoski ☎ (014) 261 438 ☒ [esperantolehti@esperanto.fi](mailto:esperantolehti@esperanto.fi)
- ♦ Lahdessa: Lahden Esperantokerho / Esperantoklubo de Lahti, (Martti Pennanen) Kalliomaankatu 10, 15150 Lahti. ☒ [martti.pennanen@pp.phnet.fi](mailto:martti.pennanen@pp.phnet.fi)
- ♦ Mikkelissä: Mikkelin Esperantokerho / Esperantoklubo de Mikkeli, (Elli Husso) Porrassalmenkatu 27 B 51, 50100 Mikkeli.
- ♦ Oulussa: Oulun Esperantoseura / Esperantosocieto de Oulu, (Allan Mehtonen) Valtatie 6-8 B 15, 90500 Oulu



Ĉi-foje la societa estraro estis komplete reelektita. Tiina Oittinen daŭrigas kiel prezidanto. Sen reelektado en la estraro daŭrigas Anna-Liisa Ali-Simola, Anna-Liisa Kylänpää kaj Leena Tiusanen. Kiel estraranoj por la jaroj 2000 ĝis 2001 estis reelektitaj Paula Harju, Varpu Karo kaj Anja Launiainen.

Vicestraranoj dum 2000 estas Ulla Salonen kaj Veikko Tikkanen, kiu ankaŭ daŭrigas kiel kasisto kaj librotenisto. Unu vicloko restis senplenigita. La estraro ricevis rajton kompletigi sin dum la jaro.

La jarkunveno elektis denove Ilpo Forström kaj Leila Laineoja kiel revizorojn kaj Jorma Ahomäki kun Kerttu Kemppinen kiel vicrevizorojn.

La agado de la societo en ĝia 39-a agadjaro enhavas malnovajn, novajn kaj espereble ankaŭ tute novajn aferojn. En majo nia printempa ekskurso direktiĝos al la kunvenejo de E-societo Antaŭen en Tampere. Somere ni verŝajne ricevos gastojn el Francio: grupo de S-ro Ramelli planas rondveturon en Finnlando.

Aŭtune ni denove kunvenos kadre de la kongreso kaj en decembro ni havos la tradician kristnaskan feston. La kafejaj renkontiĝoj en Cafétori havos novan imagon: informa budo malfermiĝas almenaŭ unu fojon monate.

Kompreneble eblas kiel ĉiam renkontiĝi kun geamikoj kaj babili pri esperantaj aktualaĵoj. Speciale la studrondoj de la societaj membroj estas daŭre aktivaj. La grava parto de nia agado, ekstera informado kaj tiel disvastigo de Esperanto realiĝos do en 2000 pere de informaj budoj en Cafétori.

Pri ili estos ĉiam informo ankaŭ en Treffigazeto de la loka ĵurnalo Turun Sanomat. Esperantokursoj organizitaj de la societo estas dividitaj en tri diversaj grupetoj, kiuj kolektiĝas unu fojon monate ĉe Tiina Oittinen. La studado daŭrigas diligente.

En la grupoj apartenas kelkaj malnovaj membroj, kiuj volas revivigi sian lingvoscion kaj ankaŭ kelkaj novuloj, kiuj espereble iam en estonteco aktivos en la societo.

Kiel ekde 1995, la societo zorgas pri la Esperanto-rozo ĉe la universitata gastdomo. La societaj membroj plej eble ofte informas pri la poemo de Wäinö Aaltonen, kiu estas legebla ankaŭ esperante sur la muro de Wäinö Aaltonen -muzeo.

Eblas merkrede inter 16-18 babili en Cafétori kun geamikoj kaj aŭdi novaĵojn pri Esperantujo. Merkrede jam je la 14-a kolektiĝos la Gaviaroj. Pliajn informojn de Anna-Liisa, tel. (02) 2387 767.

- ♦ Salossa: Salon Esperantokerho / Esperantoklubo de Salo (Matti Wallius) Eräpolku 1, 25130 Muurla ☒ matti.wallius@pp.inet.fi
- ♦ Tampereella: Esperantoseura Antaŭen / Esperantosocieto Antaŭen, (Jukka Laaksonen) Uudenkylänkuja 2 B 11, 33530 Tampere. ☎ (050) 5829 248 ☒ laakju@koti.tpo.fi
- ♦ Turussa: Turun Esperanto-yhdistys ry. / Esperanto-societo en Turku, (Tiina Oittinen) Puutarhakatu 26 A 11, 20100 Turku. ☒ tiina.oittinen@orion.fi
- ♦ Lappeenrannassa esperanton harrastajilla ei ole järjestöä, vaan "esperantoryhmä", jolle voi lähettää postia osoitteeseen (Irja Miettinen) Esperantogruppo de Lappeenranta, Yrjönkatu 6-8 A 1, 53600 Lappeenranta.

Lisäksi Suomen Esperantoliittoon kuuluu

- ♦ Suomen opettajien esperantoliitto, Jykyrintie 3, 69440 Lestijärvi. ☒ raita.pyhala@lesti.kpnet.fi ☎ (06) 8637 351
- ♦ Suomen nuorten Esperantoliitto / Finnlanda Esperantista Junulara Organizo (FEJO) Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki
- ♦ Sokeiden esperanto-yhdistys Steleto. (Ritva Sabelli) Pietarinkatu 10 D 27, 00140 Helsinki. ☒ Ritva.Sabelli@sfs.fi, ☎ (09) 660 651

Useiden paikkakuntien puhelinluettelosta hakuksanan "Esperanto" kohdalta löytyy paikallisten harrastajien puhelinnumeroita.

## Ĉu vi pretas por la veno de Dolcxamar?

Originale esperanta repo, roko kaj teknomuziko el Finnlando? Ĉu io pli malfacile imagineblas? Tamen, jes vere! Kaj eĉ pli: Dolcxamar el Porvoo/Helsinki estas aldone la plej promesiga nova bando en Esperantujo.

La bando konsistas el kvar uloj: Pieĉjo (klavaro), Stuede Salo (baso), Hippo Ohvo (gitaro) kaj Sarĉjo (kanto). Malgraŭ la strangege sonaj nomoj, ĉiuj kvar estas finnoj. Sed de kie ili subite aperis? La bando naskiĝis antaŭ jaro. Pieĉo (Patrik Austin) komencis la projekton pri esperanta muziko unue sola, ankoraŭ loĝante kaj studante en Londono, sed revenante Finnlandon, kontaktis siajn antaŭajn bandanojn kaj proponis al ili projekton pri esperanta muziko. La reago estis "bona ideo". La kvar uloj kune ludis jam longe en finnlingva, fama bando "Punaiset messiaat" (ruĝaj mesioj) kaj estas profesiaj muzikistoj. Pieĉjo jam flue parolas esperante, la tri ceteraj nun lernas Esperanton.

Dolcxamar estas kombinaĵo de vera rokgrupo kaj komputilmuziko. Sian muzikon Dolcxamar verkas komputile, samploj estas esenca elemento en la muziko. La ritmoj estas dancigaj, la tekstoj sufiĉe "durulaj". Laŭ Pieĉo la tekstoj rakontas pri sensencaĵoj de la nuna socio kaj skizas eventualajn hororbildojn pri estonteco.

*Dolcxamar*



Ili efektive pioniras muzikmonde, temas pri muzikstilo ĝis nun tute ne aŭdita esperante. Pieĉo: "Esperanto bezonas pli da populara kulturo, pop-muziko, alternativa muziko, komiksoj... kaj ne ĉio, kio naskiĝas estas laŭ ĉies gusto. Ni volas ankaŭ iom provoki kaj ne ĉiuj ŝatos nian muzikon. Sed ni sciolas pri reagoj."

Sed kial oni skribas vian nomon per ikso? Pieĉjo: "Ĉar aspektas bone kaj moderne, estas interreta afero. Ankaŭ ĉar ni celas nian muzikon ne nur al esperantistoj. Ikso estas pli facile skribebbla ol ĉo."

La bando ankoraŭ ne koncertis en Esperantujo. Sed somere vi povas propraorele sperti ilin en KEF 2000. Ankaŭ la unua disko baldaŭ aperos en la Kolekto 2000 de Vinilkosmo. Se vi ne sukcesas pacienci ĝis somero, vi povas gustumeti la bandon kaj esperantan muzikan mondon jam anticipe en Helsinki, dum vespero de "Esperanta muziko" la 11-an de aprilo.

## Arnau Torras – guro de esperanta subgrunda komikso

La kovrila paĝo de februara Esperantolehti (Komiksa bildo: Terure malbela ulo...) ŝajne vekis plurajn reagojn malfavorajn al la bildo.

La bildon desegnis la plej eminenta esperanta komiksisto, Arnau Torras. Arnau estas kataluno kaj naskiĝis en 1966. Li diplomiĝis de universitato de Barcelono pri arto kaj faras i.a. murpentraĵojn profesie. Kaj li praktike naskis originale esperantan komikson.

Liaj komiksoj estas "subgrundaj". Subgrunda signifas, ke la komiksoj estas iom alternativaj, distaj de la ĉefkulturo kaj ĝeneralaj akceptindaĵoj. Tiel ili certe ne laŭas ĉies guston. Ili grandparte konsistas el sekso, roko, festoj, vojaĝoj – aferoj tre aktualaj

en la junulara mondo, ankaŭ en la esperanta. En liaj komiksoj oni povas ankaŭ trovi bonan satiron pri esperanta movado, kaj pri junulara kaj pri malpli junulara. I.a. la albumo "La doktoro Senesperanto serĉas la bonan etoson" estas vera perlo, en kiu troviĝas eĉ pluraj konataj figuroj de esperanta movado kaj poemaj fragmentoj. Entute aperis jam tri liaj albumoj, la kvara aperos ĉi-somere.

En KEF 2000 vi povas ĝui la ekspozicion de Arnau aŭ ŝokiĝi pro ĝi – tute laŭplaĉe. Aŭ lerni komiksdesegnadon sub lia gvido.

Cetere, tiu kovrila malbelulo estas portreto de la aŭtoro mem!

## Muut lehdet

Talvipäiväsunnuntaita seuranneena päivänä oli Lapin Kansassa Merja Vehmaksen tekemä haastattelu Osmo Bullerista ja maanantaikappale kun on kyseessä Jukka Hakkaraisesta, jolla tarkoitetaan ilmeisesti Jukka Laaksosta. Keskustelu kävi kielellisestä demokratiasta esimerkiksi kansainvälisissä tie-teellisissä konferensseissa. Haastatteluun kuului myös pakollinen Zamenhofin esittely.

Satakunnan Kansassa oli 26.3 Harri Melasniemen haastattelu Porin seutu valkoinen läikkä maailmankartalla – Kuka ymmärtää esperantistia? Jarlibroon ei ole saatu Porin seudulta yhtään delegitoa. Kokkolassakin on muutama esperantisti, mutta kerhoa ei.

Entä muu länsirannikko? Ja tätä kautta kulkevat ulkomaalaisten turistien virrat, joiden joukossa on myös esperanton harrastajia.

Sisä-Savon Sanomien musiikkiarvostelija oli tehnyt jutun konsertista, jonka järjestäjänä oli Esperanto Savo. Pääosa lauluesityksistäkin oli esperantoksi. Vesannolla on väkilukuun nähden maan suurin esperanton taitajien keskittymä. Konserissa esiintyivät kuopiolainen urkuri Esa Toivola sekä vesantolaiset solistit Marjaana Hukka ja Maija Röntynen-Huttunen, jotka esittivät Mika Piiparisen *Rigardu bel matenon*, A. Fiorentinin *La vera paco*. Duettona he esittivät *Floras la tero* (Maa on niin kaunis). Jokainen kolmesta esiintyjästä on esperantisti.

Palautusosoite: Esperantoliitto  
Siltasaarencatu 15 C 65, 00530 Helsinki



## Libroservo

Tilaan seuraavat kirjat. (Rasti ruutuun.)

- |                                       |                          |       |
|---------------------------------------|--------------------------|-------|
| Korea antologio de noveloj. 148,98 mk | <input type="checkbox"/> | _____ |
| Hejma vortaro. 51,73 mk               | <input type="checkbox"/> | _____ |
| Pasporta Servo                        |                          |       |
| La listo de gastigantoj 75,18 mk      | <input type="checkbox"/> | _____ |
| Bakin,                                |                          |       |
| Familio. (romani) 165,53 mk           | <input type="checkbox"/> | _____ |
| Solotronik,                           |                          |       |
| PoLimoRFiA ArKiteKniA.                |                          |       |
| 103,46 mk (vidbendo)                  | <input type="checkbox"/> | _____ |
| Sabira Ståhlberg,                     |                          |       |
| Durankulak. 50 mk                     | <input type="checkbox"/> | _____ |
| Proverbaro de Röntynen. 87 mk         | <input type="checkbox"/> | _____ |
| Edith Södergran,                      |                          |       |
| Lando malekzista. 50 mk               | <input type="checkbox"/> | _____ |
| T-paidat:                             |                          |       |
| KEF-paidat. Koot S–XXL. 70 mk         | <input type="checkbox"/> | _____ |

Posti-  
merkki

**Suomen Esperantoliitto/  
Sihteeri  
Siltasaarencatu 15 C 65  
00530 Helsinki**

Jos haluat useampia kappaleita kyseistä tuotetta, merkitse kappalelukumäärä rastin oikealle puolelle. Tilaukset kunkin kuun 15. päivään mennessä. Kirjalähetyksen mukana seuraa lasku.

Tilaajan nimi ja osoite: \_\_\_\_\_

### Seuraava numero ♦ Venonta Numero

Seuraava numero ilmestyy 1.6. Jutut 15.5 mennessä Aimo Rantaselle, os. PL 2, 40801 Vaajakoski, puh. (014) 261 438. Venonta numero aperos 1.6. Artikoloj ĝis 15.5 al Aimo Rantanen, adr. PL2, FI-40801 Vaajakoski, tel. (014) 261 438.